Ŝtonriĉa Berlino

Se s-ino *Andrea Heinke* volas spekti ĉiujn siajn trezorajojn, pri kiuj ŝi respondecas, ŝi devus trafosi dum pluraj monatoj ekzakte 19 243 tirkestojn de entute 705 ŝrankoj, aldone 185 vitrinojn – kun ĉirkaŭ 1,5 milionoj da ŝtonoj, mineraloj kaj fosilioj. La "Geologia Kolekto" de Berlino/Germanio – ekde nelonge lokita en la monumentliste protektita *Behrend*-kazerno – estas unu el la plej grandaj kaj multnombraj geologiaj kolektoj de la mondo. Ĝi estas propraĵo de la germana "Federacia Institucio pri Geoscienco kaj Krudmaterialo", kaj nuntempe estas prizorgata de la Muzeo pri Naturscienco. La plej aĝaj trovitajoj havas 600 miliardojn da jaroj. Geologoj, klimatologoj kaj paleontologoj okaze de studoj kaj esplorlaboroj traserĉadas la ŝrankojn – sed ankaŭ arĥitektoj kaj domkonstruistoj, kiuj revas pri bela naturŝtona dezajno por sia nova konstruaĵo…

(*National Geographic* 6/2000, p.18)

Anstataŭ la Ĉinan muron…

– kiun surteran linion astronaŭtoj povas spekti el la kosmo? Nu, per nudaj okuloj ne estas ekkonebla la ĉina muro por spacveturantaj astronaŭtoj. Sed, post paso de kelkaj jaroj, ili foje vidas iun plurcentkilometrojn longan linion transverse en Pacifiko. Tiu linio, kiu povas esti larĝa 2 kilometrojn, konsistas el diatomeoj kaj havas la koherecon kiel dika supo. Diatomeoj apartenas al la planktono kaj havas korpan kovraĵon el silicio-dioksido, kiu utilas por la produktado de stratlumreflektoroj, filtriloj, dinamito kaj dentopasto.



La plirapidigita kreskado de diatomeoj nuntempe okazas nur kun kelkjaraj intervaloj, pli frue tia plimultiĝo verŝajne daŭradis milojn da jaroj: ĉar almenaŭ kvin fojojn en la lastaj 15 milionoj da jaroj ekkreskadis enormaj matoj, kiuj flose moviĝis – grandaj kiel Aŭstralio – tra Pacifiko. Oni supozas, ke la diatomea matoplektado ĉesis antaŭ kvar milionoj da jaroj post la estiĝo de la terponto inter Norda kaj Suda Amerikoj, kiu kaŭzis tute aliajn hidrodinamikajn fluad-tendencojn.

(2009-09-11)

Scienca Revuo Vol. 61 (2010) (4) / n-ro 223

Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)
Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.
Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj
Laserkopiita: okt/nov/dec 2010 ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30 DE - 37269 Eschwege*/Germanio
Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj

Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare
pagebla pere de via
a) landa peranto (aŭ landa delegito)
aŭ rekte al la
b) ISAE-konto **isae-z** ĉe UEA/*Rotterdam* (NL), sed nepre informu pri via membrokotizpago laŭ la suba adreso.

Landaj Perantoj de ISAE

Aŭstralio	*Libroservo AEA*	*<libroservo@esperanto.org.au>*
	143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.	
Brazilo	*Brazila Esperanto-Ligo (BEL)*	*<bel@esperanto.org.br>*
	C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília	
Britio	*S-ino Viv O'Dunne*	*<eab@esperanto-gb.org>*
	p.a. Esperanto Asocio de Britio (EAB)	
	Station Rd., Barlaston	
	Stoke-on-Trent, Staffordshire, ST12 9DE Britio	
Finnlando	*S-ino Päivi Saarinen*	*<paivi.saarinen@iki.fi>*
	Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo	
Francio	*S-ro J.Charles Trébouet*	*<trebouet.bohere@club-internet.fr>*
	Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil	
Irlando	*S-ino Joy Davies*	*<noviresp@eircom.net>*
	9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W	
Korea Resp.	*S-ro Cho Sung Ho*	*<shcho@inha.ac.kr>*
	Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751	
Norvegio	*Eldonejo Esperanto*	*<hara-ryg@online.no>*
	Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo	
Pollando	*S-ino Magdalena Tatara*	*<mtatara@gmail.com>*
	Košmice Wilkie 323, PL32-020 Wieliczka	
Svedio	*S-ino Lisbeth Andréasson <bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>*	
	Kajsa Kavats gata 8, SE - 24235 Hörby	
Usono	*Esperanto-USA*	*<eusa@esperanto-usa.org>*
	1335 Stanford Ave, Suite 300, Emeryville CA 94608, USA	

*) **Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b) (kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendata Scienca Revuo) la eldonanton:**
Prof. Dr. R. Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio
Tel. xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>